# Ekzercoj por Venus' la fina venk'. --- Sceno unu

Rimarko: por solvi la taskojn, unue legu la unuan scenon de la teatraĵo ***Venus' la fina venk'.*** La teksto troviĝas en la LERNILOTEKO. La solvojn petu ĉe katalin@ikso.net.

## 1) VORT-DIFINOJ

*Ligu la vortojn el la scenoj kun konvena difino. Vi havas du nebezonatajn difinojn, nur por malfaciligi vian tagon. Nedankinde!*

| | |
|---|---|
| 1. oblikva -------------------- | A: antaŭdiri |
| 2. asterisko -------------------- | B: grandvida plano |
| 3. strategio -------------------- | C: intensa kaj entuziasma |
| 4. prognozi -------------------- | Ĉ: malatenti |
| 5. esploro -------------------- | D: maloptimismo |
| 6. manifestacio -------------------- | E: malrekta |
| 7. neglekti -------------------- | F: pasiva kaj senviva |
| 8. furora -------------------- | G: prem-butono |
| 9. defetismo --------------------- | Ĝ: publika kunveno |
| 10. klavo --------------------- | H: sistemece farita malkovro |
| | Ĥ: stelforma floro |
| | I: stelforma interpunkcio |

## 2) UNU EL KVAR

*Jen frazoj aŭ demandoj pri la sceno. Sed mankas vorto aŭ vortoj aŭ respondo. Vi jam imagas la ludon! Ni proponas al vi kvar alternativojn, el kiuj nur unu estas ĝusta. Elektu tiun!*

**1. UK estas mallongigo por _________.**
a) Unuiĝinta Komisiono
b) Universala Kongreso
c) Utopia Kunveno
ĉ) Urugvaja Komitato

**2. Oni varbis sukcese en Nepalo menciante UK en ______**
a) Katmanduo
b) Detrojto
c) Roterdamo
ĉ) Las Vegas

**3. Je kiuj du organizoj oni kalkulas por pliigi la nombron de esperantistoj?**
a) Komitato kaj Estraro de UEA
b) Rondo Familia kaj la TEJO-kongreso
c) Rondo Harmonia kaj la Infana Kongreseto
ĉ) Akademio kaj Lingva Komitato

**4. La vojo antaŭen estos _________ .**
a) longa kaj pena
b) stranga kaj plena
c) atinga kaj plana
ĉ) unga kaj puna

**5. Oskar prognozas ke la nombro de landoj en la mondo ________.**
a) restos la sama
b) kreskos
c) malkreskos
ĉ) neniuj el tiuj

**6. La elirpunkto de Oskar taksante la nombron de esperantistoj estas la nombro de ________ en la mondo.**
a) landoj
b) personoj
c) asocioj
ĉ) kalkuliloj

**7. "Ne allasi defetismon" estis slogano lanĉita de ______________**
a) Edmond Privat
b) Hector Hodler
c) Ludoviko Zamenhof
ĉ) Ivo Lapenna

**8. KER estas mallongigo por ________**
a) Komitato de Esperantistoj en Roterdamo
b) Kunordiga Ekspozicia Registro
c) Komisiono por Eksteraj Rilatoj
ĉ) Kanada Ekzamena Regiono

**9. TEVA estas mallongigo por la Tutmonda Esperantista _______ Asocio**
a) Vegetala
b) Vegetarana
c) Veterana
ĉ) Veter-prognozista

**10. Por esti kalkulita kiel esperantististo oni devas tra kurso-pordo ŝovi sian _____.**
a) orelon
b) nazon
c) manon
ĉ) piedon

### 3) MIKSITAJ VORTOJ

*Jen kelkaj vortoj el la sceno. Sed la literoj estas miksitaj. Malmiksu ilin kaj skribu la vortojn en la korespondaj spacoj aŭ kvadratoj. Fine, prenu la literojn kiuj sidas en la kvadratoj kaj rearanĝu ilin por malkovri la kompletigon de la kaŝ-frazo sube. En malmultaj kazoj (tre malmultaj!) ni kompatas vin kaj jam donas literon.*

Ĉ A S V I N D O ☐ ☐ ☐ _ _ _ _ _

L A S K L A K U ☐ ☐ _ _ _ _ _ ☐

S A T K O I T I S T ☐ ☐ ☐ _ _ _ _ _ _ _

E N V I A L A N T ☐ _ _ _ ☐ _ _ _ ☐

B R U T I S I K O N ☐ _ ☐ ☐ _ _ _ _ _ _

C E N T O J N M O K A ☐ _ _ _ _ _ _ ☐ ☐ _ _

La esperantistoj havas mision. Ili havas

_ _ _ _ _ _ _   _ _ _ _ _ _ _   _ _ _ _ **O** _

### 4) DEMANDOJ

1. Kiun taskon volas fari la esperantistoj?
2. Kial ili volas plenumi tiun taskon?
3. Kiun rolon havas Mart en la kunsido?
4. Kial Aldo alvenas malfrue? Kion li kunportas?
5. Kiu estas la prognozisto en la kunsido?
6. El kiu lando venis la raporto pri varbado? Kie situas tiu lando?
7. Kion prezentis la raporto? Ĉu ĝi estis pozitiva aŭ negativa?
8. Kial la unua kalkul-rezulto de Krista estis nekredinda?
9. Kio estis la fina konkludo de la esperantistoj?
10. Kial estas malpli facile altigi la nombron da esperantistoj kompare kun tiu por aliaj lingvoj?

**5) PARIGU**

*Jen fraz-komencoj kaj fraz-finoj pri la sceno. Ligu ilin. Por la intelekta stimulo, vi havas du superfluajn fraz-finojn. Plezure liveritaj!*

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. | Ili taksas... | A | alian argumentadon kaj strategion. |
| 2. | Mart transdonas... | B | arakidpastajn sandviĉojn. |
| 3. | Aldo petas ke oni pardonu... | C | kreskon en la nombro da landoj en la mondo. |
| 4. | Oskar prognozas... | Ĉ | la helpon de TEJO kaj Ronda Familio. |
| 5. | Klari volas enkalkuli... | D | la kalkulilon en la sandviĉo de Aldo. |
| 6. | Ili ĵus ricevis... | E | la nombron da esperantistoj en la mondo. |
| 7. | Krista retrovis... | F | la nombron da esperantistoj sur Venuso |
| 8. | Ili urĝe bezonas... | G | la parolon al la estrarano pri elirpunktoj. |
| 9. | Aldo devas nepre manĝi... | Ĝ | lian malfruon. |
| 10. | Mart diras ke ili serĉu... | H | raporton el Nepalo |
| | | Ĥ | tiujn kiuj ŝovis nazon tra kurseja pordo. |
| | | I | Universalan Kongreson en Las Vegas |

**Daŭrigota. Serĉu la ekzercojn preparitajn por la aliaj scenoj.**
**La solvojn vi povas peti en retmesaĝo ĉe la redaktanto@edukado.net.**